

## La Esperanta Muziko

preparis Leston Buell

### 1. Demandoj

1. Kie vi povas trovi informojn pri la Esperanta muziko?
2. Rakontu kiun muzikon en Esperanto vi jam aŭskultis.
3. Kiuj estas viaj plej ŝatataj muzikistoj en Esperanto?
4. Ĉu vi iam verkis kanzonojn en Esperanto?

### 2. Tekstoj

#### La Espero

*verkis Ludoviko Zamenhof*

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion:  
Al la mond' eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero  
Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la Esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj,  
Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.

## **Samarkando**

*ludas Ĵomart kaj Nataŝa*

Kiam mi estis infano,  
ofte rakontis panjo  
pri fora fabela lando,  
pri Samarkando.

Kaj ankaŭ mi ofte revas  
lasi ĉiujn aferojn  
kaj iri laŭ ŝoserando  
al Samarkando.

*Refreno:*

Kie loĝas feliĉaj homoj  
en varmaj, komfortaj domoj,

tie neniu ploras  
kaj ne angoras.

Sed tenas miajn piedojn  
laboro, kutimoj, hejmo,  
ne lasas min al revo:  
devoj, devoj...

Eble mi povos iam  
esti denove libera,  
do direktos mi miajn plandojn  
al Samarkando.

---

## **La malnova balancilo**

*ludas Kajto*

Balanciĝas kvinjaraĝa etulino.  
Ŝi loĝas for ĉe alia stratofino.  
Ŝi ofte nudpiede ĉi tien venas  
Por revu, kiam vivo splenas.  
Ŝian brunan juton robon jam eluzis  
Du fratinoj, kiuj ankaŭ sin amuzis  
Per la balancilo por promenvetur'  
De la tero al la ĉielo: grandplezur'!

Ĉe la dorso de la knabino sidas frato.  
Dum li ludas, ne turmentas lin malsato.  
Li firme ĉirkaŭbrake talion tenas  
De la fratino kaj nuntempe li serenas.  
Fermas la okulojn tiu bubo;  
Supren kaj malsupren fidus li sen dubo,  
Kaj plengorĝe ridas, homnatur'!  
De la ĉielo al la tero: grandplezur'!

De la baskulo sur la fronta ekstremaĵo  
Sidas knabo kun eleganta vestaĵo,  
Proksimume dekjaraĝa; li kunĝuas.  
Ja riproĉojn li meritos, ĉar malfruas.  
Li ne rajtas tiun lokon frekventi.  
Pro ŝirita jako devas li plu penti.  
Sed nun gravas nek veluro, nek futuro.  
De la tero al la ĉielo: grandplezur'!

Tri infanoj kune nun feliĉas.  
Per animo hela, ĝoja ili riĉas.  
Kaj se vi alvokas, vin ili ne aŭdas;  
Fajfis eĉ trifoje trajno, kiu laŭdas,  
Sed momente ili ne plu apartenas  
Al la plenkreskula mondo, kiu svenas.  
Sune ili estas meze de la obskur'.  
De la ĉielo al la tero: grandplezur'!

### 3. Utilaj Vortoj

#### el la tekstoj

ŝoseo: *paved street*

rando: *edge*

angoro: *anguish, distress*

plando: *sole*

etulino: *little girl* (et+ul+in+o)

spleno: *the blues, melancholy, deep depression*

juto: *burlap*

balancilo: *see-saw*

talio: *waist*

bubo: *boy, lad*

gorĝo: *throat*

baskulo: *see-saw*

riproĉo: *to chide, reprimand*

sveni: *to faint, swoon*

